

14741 Aparato kiel interfacio inter veturila ekipaĵo laŭ trajnsekurigsistemo ETCS kaj trajno.

franca *unité d'interface train* germana *Fahrzeug-Schnittstellenmodul* hispana *unidad de interfaz del tren*

terminproponoj (ĉiuj kun noto **ETCS**):

- 1) interfacmodulo veturila** **2) i. veturilekipaĵo / trajno**
3) i. de veturilekipaĵo rilate al trajnregado **4) adaptilo veturilspecifa**
5) regadaptilo veturilspecifa **6) sistemadaptilo specifa veturilflanka**

Por sendo de kontribuoj anticipe dankas *Heinz Hoffmann* kaj *Guido Brandenburg*.



NEKROLOGO

Kun profunda kordoloro ni sciigas la fervojistan esperantistaron, ke **Per Engen** – kelkajn tagojn antaŭ sia 90-a naskiĝtago – la 25-an de Majo 2014 forlasis nin.

Li estis membro de Norvega Esperantista Fervojista Asocio ekde 1952 kaj aktive partoprenis en la laboro de Faka Komisiono de IFEF.

Pro lia entuziasma kaj efika agado la komitato de IFEF en 1980 elektis lin Vicprezidanto de IFEF, kiun postenon li okupis ĝis 1988, kaj inter la jaroj 1990-1998 li estis la prezidanto de IFEF.

Li ricevis distingojn en 1988 „Honora Membro de IFEF”, en 1998 „Honora Prezidanto de IFEF”, kaj samtempe „Ora Medalo de FISAIC”. Krom ĉiuj meritoj *Per* estis ĝentila homo kaj bona amiko. Multaj IFEF-anoj memoras lin, kaj gajajn horojn kun li.

La Esperanto-movado kaj ĉefe IFEF perdis meritplenan membron.

Kara *Per* ripozu en paco!

Redaktoro de Internacia Fervojisto (mallongigita)

Alvoko por prelegoj

Karaj geamikoj, ĉe 67-a IFEF-kongreso en *Kunming* verŝajne partoprenos malpli da eŭropanoj ol kutime. Tamen ankaŭ tie ni volas prezenti kelkajn fakpreleg(et)ojn el Eŭropo. Sekve ni petas ne heziti, sed prepari fakajn tekstojn ankaŭ je neĉeesto en Ĉinio. Tiukaze ni petos partoprenontajn gekolegojn, tie laŭtlegi la tekstojn.

Temojn – nome titolojn kun koncizaj resumoj bonvole sendu ĝis fino de 2014 al *Ladislav Kovář*, *Grégrova 44, CZ-560 02 Česká Třebová* aŭ al ties retadreso <kovar.lad@email.cz>. Ĉinaj kolegoj aldone petas, laŭeble sendi la kompletajn tekstojn kun simpla memprezento de la aŭtoro al sia retpoŝta adreso <67ifefkongreso2015@gmail.com>. Tiukaze bonvolu sendi kopion por faka revizio al *Heinz Hoffmann* <hoffmann-ifef@cablemail.de>

Anticipe dankas *Jan Uldal Niemann* kaj *Ladislav Kovář*.

Terminara Kuriero

TeKu 149

Septembro 2014

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Poŝtelefono: +45 71 70 63 83 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: hoffmann-ifef@cablemail.de

Karaj gekolegoj,

el trakto de nocioj ĉe 66-a IFEF-kongreso en *San Benedetto del Tronto* rezultis jenaj termindecidoj:

el TeKu 147:

14389 **disforkiĝa liberigpunkto** laŭ propono 2)

14510 Pro malklareco denove pripensu post la kongreso. La rezulton vidu sube.

14512 **komutejo mekanika** kun forigo de superflua "lokproksima"

14609 **komutado per loka komutejo** kun modifo: lokproksima → loka

14611 **manovradzono malŝaltebla de regejo** pro kompleta reta jeso sen trakto en kunsido

14701 **komutejo** laŭ propono 2), sed kun forigo de superflua "lokproksima"

el TeKu 148:

03332 **radaksmovo senpera** laŭ nova propono

09038 **trajno sekurprova** laŭ nova propono

09048 **labortrajno** laŭ propono 1) – kiel ĝis nun

11391 **veturciklo** laŭ propono 2)

12052 **trakokurbiĝo transira** laŭ propono 2)

12135 **agopunkto de trakforka regmekanismo** laŭ propono 1) – kiel ĝis nun


La postkongresa esploro de nocio 14510 rezultis iometan modifon de la difino:

Sekcio (ne Trakcirkvitsekcio) de anoncosistemo pri libera trakto, ne senpere apartenanta al itinero, sed unufine transiĝanta la koncernan trakokonverĝan limpunkton.

Plej bone taŭgas la termino:

14510 **traksekcio liberanonca trans trakokonverĝa limpunkto**

La lasta skizo sur paĝo 4 de TeKu 147 ne estas ĝusta. Jen la korektita:



Kelkaj novaj taskoj

04050 Funkciigmaniero de bremsaparataro, ĉe kiu la rapido malgrandiĝas, sen haltigi la trajnon.

ĉeĥa *příbrzdění*
 dana *afbremsning*
 franca *freinage de ralentissement*
 germana *Verzögerungsbremmung*
 hispana *frenado de retardo*

hungara *lassító fékezés*
 itala *frenatura di rallentamento*
 kroata *kočenje radi usporavanja*
 pola *hamowanie zwalniająca*
 rumana *frânare de încetinire*
 slovena *upočasnjevanje voznje*

terminproponoj:

- 1) **bremsado lantiga** (kiel ĝis nun) 2) **b. senhaltiga**
 3) **b. malrapidiga** 4) **b. rapidredukta** 5) **b. malakcela**

PIV: **lanta**. Malrapida: *lanta paŝo, ritmo, parolmaniero*.


06731 Relajsa regejo konsistanta el normigitaj komponantoj, kiuj estas interligitaj en vicordo laŭ trakarskemo de la regata zono.

bulgara *релејно управление на табло*
 ĉeĥa *stavědlo s tlačítkovým ovládacím stolem*
 dana *geografisk relæsikringskabelanlæg*
 franca *poste à circuits géographiques*
 germana *Spurplanstellwerk*
 hispana *puesto de circuitos geográficos*
 hungara *nyomvonalterves biztosítóberendezés*
 itala *apparato centrale a pulsanti a relè a cablaggio topografico*
 kroata *postavnica u geografskoj izvedbi*
 pola *nastawnica przekaźnikowa geograficzna*
 rumana *instalație de centralizare cu luminoschemă geografică*
 slovena *postavljalnica s sledilno tehniko*


La ĝisnuna Esperanto-termino "trakarpanelregejo relajsa" ne bone taŭgas.

terminproponoj:

- 1) **regejo relajsa traskema** 2) **r. r. trakplana**
 3) **r. r. traskemokongrua** 4) **r. r. trakarstruktura**



regpupitro



el grupinterliga plano de regejo sub 06731

07372 Fervojesto kiu observas trajnveturojn kaj neceskaze ordonas agojn de trajntrafikestroj sur liniosekcio.

bulgara *влаков диспечер* hungara *menetirányító; diszpécser*
 ĉeĥa *dirigent; vlakový dispečer* itala *regolatore; dirigente*
 dana *togleder* kroata *prometni dispečer*
 franca *régulateur; dispatcher* pola *dyspozytor*
 germana *Zugüberwacher; Dispatcher* rumana *regulator de circulație; dispecer*
 hispana *regulador de línea* slovena *vlakovni dispečer*

terminproponoj:

- 1) **trajntafikreguligisto** (laŭ ĝisnuna termino) 2) **~disponisto**
 3) **~estro supera** 4) **~estro gvidanta** 5) **~kontrolisto** 6) **~observisto**

14740 Modulo kiu garantias interŝanĝeblecon de veturila ekipaĵo laŭ trajnsekurigsistemo ETCS kun vojflankaj trajnsekurigaj instalaĵoj ne ETCS-sistemkonformaj.

franca *module spécifique de transmission* germana *spezifisches Übertragungsmodul* hispana *módulo específico de transmisión*

terminproponoj (ĉiuj kun noto **ETCS**):

- 1) **interfacmodulo traksistemadapta** 2) **transigmodulo diferencsistema**
 3) **t. nur veturiflanke sistemkonforma** 4) **adaptilo nacispecifa**
 5) **traksistemadaptilo nacispecifa** 6) **sistemadaptilo specifa trakflanka**